9-a JARO, N-o 405 MONATA ESPERANTO-GAZETO 25.5.1933

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO : 14, av. de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO : E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO.
ADMINISTREJO : 23, rue Boyer, Paris 20e.

EPILOGE

Marks ne estis marksisto.

Laŭ mia promeso ĉi tiuj epilogaj diroj ne devas esti enuaj k kaprompaj.... Mi kutimas plenumi promesojn, libere faritajn, sed ĉu estas eble paroli pri marksismo, ne devigante la leganton dormige cerbumi? Eble jes. Almenaŭ mi provos. Bonvolu aŭskulti jenan anekdoton :

Antaŭ dektri jaroj, ĉe la fondo de SAT en Prago, mi havis la okazon konatiĝi k interparoli kun K-do, kiu jam de longe estas profesoro pri marksismo. Dum nia interparolo li demandis :

— Ĉu vi konas persone la aŭtoron de tiu serio da artikoloj, aperintaj en *Esperantista Laboristo* kun la titolo : « For la Neŭtralismon! » k subskribitaj *Sennaciulo*?

Aplombe mi respondis, ke ne. Kaj por trankviligi mian konsciencon, mi diris al mi : nur saĝuloj ja konas sin mem.

— Almenaŭ mi estas certa, ke li estas marksisto, aldiris mia interparolanto.

Verdire, kiam mi aŭdis tiujn vortojn, mia surprizo estis granda. Tiutempe mi eble jam ne estis leginta eĉ « La Komunistan Manifeston ». Ĝis tiam la soci-politikaj aŭtoroj, kun kies verkoj mi konatiĝis, estis Bakunin, Kropotkin, Reklu, Grav k. a. anarkistaj teoriuloj. Forpasis relative multaj jaroj. La tutan verkaron de Marks mi funde ne studis; tamen el ĝi k pri ĝi mi legis multon. Malgraŭ tio mi ne kuraĝus diri, ke mi estas marksisto. Tion mi tute ne scias k eĉ ne deziras scii. Starigante soci-politikan demandon, neniam mi ekhavas la penson traserĉi en la verkoj de Marks por trovi respondon. Mi havas la konvinkon, ke neniu el la plej kompetentaj komentistoj de Marks povas prave havi la pretendon scii, kiuj estus la pensoj, la sinteno de ilia majstro antaŭ nuntempaj problemoj.

Sendube estas interese scii precize, kiel okazas la ekspluatoprocezo de la kapitalo super la laboro. Tion montris Marks tre klare. Sed tia scio ŝajnas al mi nur flanka afero. Koni la kaŭzojn de malsano ne ĉiam sufiĉas por resanigi pacienton. Doni bonan recepton povas esti tute vana afero, se la malsanulo ne scias, ne povas aŭ ne emas apliki ĝin. La persona, sugesta influo de kuracisto povas iafoje pli efiki ol medikamento. En la vivo de l' socioj psikologiaj faktoroj, senpezaj fortoj ankaŭ ludas gravan rolon. Eĉ en ĥemia komponaĵo katalizaj[1] fenomenoj estas necesaj por ĝin modifi. Ĉu Marks, k ĉefe la t. n. marksistoj, taksas sufiĉe alte tiajn faktorojn? Mi emas kredi, ke ne. La klarigoj, kiujn ekzemple ili donas pri la lastatempaj okazintaĵoj en Germanio, ŝajnas al mi tute ne sufiĉaj, ne konvinkaj.

En la antaŭparolo al « Naciismo » mi parolis pri la forto de ideoj k la Hitlera movado tre bone pravigas k ilustras tiun vidpunkton. En Germanio la socialisma ideo jam forte penetris en la mensojn de l' proletaro; sed la naciismo restis tamen tre forta, tial ke neniu partio penadis ĝisradike detrui tiun ideon per laŭcelaj rimedoj. Sufiĉis do al lerta demagogo kunigi tiujn du ideojn (naciismo k socialismo) por starigi movadon, kiu donis al li la regadon super la lando.

Sed ne estas mia intenco pritrakti nun tiun temon. Mi celas nur altiri denove la atenton de la SAT-anoj al tio, ke estas ĉiam danĝere akcepti iun ajn teorion, doktrinon senkomprene, blinde, fide al ĝiaj komentistoj. Tia akcepto signas ĉe la ano religieman spiritostaton. Kiam homoj sin demandas *unue*, ĉu ĉi tio aŭ tio konformas aŭ ne kun iu doktrino, anstataŭ senantaŭjuĝe esplori la realaĵon, la krudajn faktojn, tio estas signo de spirita malviglo k kondukas neeviteble al starigo de nova religio kun novaj pastro-komentistoj. Ekzemple, kiam sovetiaj teoriemuloj komencis cerbumi por doni *marksisman* pravigon pri la ekzisto de esp-o, estas nekredeble, kiom da sensencaĵoj ili eldiris, kiom da ridindaj skolastikaĵoj ili elpensis....

Ĉe la VIII-a Kongreso de SAT, *kiun partoprenis pluraj sovetiaj K-doj*, la SAT-anoj agis tre saĝe, akceptante *unuanime* aldonon al nia Statuto, laŭ kiu ni ĉiuj devas zorgi, ke niaj opinioj neniam fariĝu nediskuteblaj dogmoj.

Se la marksismo difinis ĝuste la vojon, kiun nepre sekvos la homa socio, la venko de Hitler povas esti nur nelongdaŭra. Lia fajra detruado al la marksistaj libroj estas do tute vana entrepreno. Sed, sammotive, ne multe helpas al la sukceso de l' marksismo la aserto, ke ĝi estas la vero, la sola, kiu devas esti oficiale k devige encerbigata....

Sur la propagandiloj, kiujn ni eldonis antaŭ dektri jaroj, mi relegas interalie jenon :

« La ideala socio ne devenos tute preta el Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon. Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondcivitanoj, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata, enlanda edukado metis dum nia infanaĝo en niajn kapon k koron. SAT celas kutimigi sian anaron al eksternacia sent-, pens- k agadkapablo. Ĝi zorgas, pri la kreado de spiritostato, kiu harmonios kun la estonta socio, kiam la perforto nuna, la ekonomiaj, lingvaj k ŝtataj limoj ne plu ekzistos. SAT celas krei sennaciecan popolon. »

Mi ne scias, ĉu tiuj diroj estas aŭ ne marksistaj. Skribante ilin, tiam mi tamen estis bolŝeviko, ĉar partia membro-karto kuŝis en mia poŝo; tiam miaj sampartianoj ne malaprobis tian « idealismon ». Ĝi ne ankoraŭ fariĝis herezaĵo. Hodiaŭ, rigardante al la disigita laborista movado, certe neniu asertos, ke tia stato estas la rezulto de troa idealismo : ĉie regas suspekto, malamo, fanatiko, mensogo, fratbatalo. Tial, pretiĝante forlasi la gvidpostenon, mi emas memorigi al la K-doj la principojn, kiuj ekde la komenco signis al ni la vojon. Miaopinie, ili restas same taŭgaj hodiaŭ; ili certigis la sukceson de SAT dum multaj jaroj k nur kiam fanatikuloj k « realistoj » volis ignori ilin, venis la disiĝo k malprospero.

Al tiuj, kiuj sin nomas marksistoj, mi volas memorigi, ke iun tagon, aŭdinte, ke ekzistas « marksistoj », Marks mem pikparole eldiris : « Mi almenaŭ ne estas marksisto!... » La genia aŭtoro de « La Kapitalo » sendube jam ĉagreniĝe antaŭvidis, ke liaj instruoj fariĝos por kelkaj el liaj disĉiploj dogmaj, senvivaj parkeraĵoj.

E. L.

[1] *Katalizo*, fenomeno, per kiu ŝtofo efikas sur reakcion (naskas aŭ akcelas ĝin), sen ke ĝia konsisto ŝanĝiĝu dum tiu reakcio.

Antaŭkongreso al la XIII-a en Malmö.

La esperantistoj de Malmö arangos ĵaŭde, la 3-an de aŭgusto, antaŭkongreson en sia urbo. Atentu do, Gek-doj vizitontaj Stokholmon okaze de la XIII-a Kongreso! Ni zorgos kiel eble plej bone pri senpaga tranoktejo por ĉiuj eksterlandanoj, kiuj anoncos sin, k faros ĉion por agrabligi la restadon ĉi tie. La Parko del' Popolo (la plej grandioza popolparko en Svedio) estos la ejo por la arango. Proksimuma programo :

1. Kolektiĝo en la parko je la 18-a horo.
2. Reprezentanto dela Komitato salutas la gastojn.
3. Reprezentatojn de Malmö-aj laboristaj organizoj salutparolas.
4. Esperantista ĥoro.
5. Salutparoloj de eksterlandaj K-doj.
6. Kolektiĝo en la restoracio.
7. Parolado por esp-istoj k invititoj pri lab. esperantismo.

Eventualaj pliaj aranĝoj. Por K-doj, kiuj venos unu aŭ plurajn tagojn pli frue, ni bone aranĝos la restadon. Adreso de la Komitato :

E. Norman, Stureg. 9, Malmö (Svedio).

****

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj.

La 18-a Kongreso de la Federacio de Lab. Esperantistoj en la regiono de la nederl. lingvo.

Tiu Kongreso okazis de 15/17 aprilo en Amsterdamo, en la konstruo « De Brakke Grond », konata de multaj SAT-anoj. Ĝin vizitis pli ol 500 anoj; reprezentitaj estis 60 sekcioj kun sume proks. 1 700 anoj. 8 sekcioj ne sendis reprezentantojn. Memorige raportis la prezidanto, K-do *Faulhaber*, en la malferma parolado, ke la nombro da anoj en la sekcioj kreskis per 600; ĉeestis 15 novaj sekcioj unuafoje ĉi tiun kongreson.

Starigitaj estas Ekzamena Komitato, provincaj distriktoj, federacia konsilantaro k gazetar-servo. Eldonitaj estas lernolibro por komencantoj; studlibro « La konsilanto »; historia libreto (en kunlaboro kun SAT) « La Gvidilo ». Ĵus aperis propaganda maja n-ro de « Lab. Esp-isto » kun eldonkvanto de 60 mil ekz-oj.

La kongreso estas buŝe salutita de reprezentantoj de la *Lab. Sportligo* (NASB), *Liberpensula Societo* (De Dagerood), *Internacia Kontraŭmilita Asocio* (IAMV), *I. T. E. T. T.* (holanda sekcio de transportlab. esp-istoj) k *Societo por blindaj esp-istoj* k letere de pluraj sindikatoj. Ok leteroj el div. landoj trafis la kongreson.

Okazis 4 kunsidoj. La unua estis plej grandparte okupita per la malfermo k salutoj, en la aliaj, gravaj proponoj estis serioze pritraktataj. Escepte negrava incidento dum pritrakto de la raportoj, la kongreso montris preskaŭ unuanime sian inklinon al daŭrigo de konstrua laboro laŭ la nuna formo. La opozicio, kiu laŭ decido de la unua kongreso de IPE en Berlino klopodis penetri por skismiga celo en la Federacion, k prezentis tiucelajn proponojn, plene malsukcesis. Estis vere iom kompatinde konstati, kiel la opoziciuloj klopodis defendi — vane — siajn proponojn k starpunkton.

Ĉu ili ankoraŭ post la kongreso iris hejmen kun la konvinko, ke IPE povus utili al la klasbatalo, laŭ sia strukturo, k ne kun tiu ekkono, ke *nia* movado, ke SAT estas, laŭ sia fundamenta koncepto, pli perspektivohavaj?

La kongreso aprobis la raportojn k la buĝeton, kiu sumiĝas je 6 000 guldenoj. La proponoj por nuligi la Apeldornan rezolucion, prezentitaj de la opozicio, ne estis pritraktataj pro akcepto de ordopropono.

La propono de la estraro rilate al « Sennaciulo » estis *akceptata* per 1510 voĉoj kontraŭ 158. Depost la 1-a de julio proksima, la anoj do ricevos sinsekve ĉiumonate « Lab. Esp-isto » n k « S-ulo » n. « L. E. » do fariĝos monata organo.



La ceteraj proponoj, kiuj precipe estis internaj, trovis plenan atenton ĉe la kongreso. Ĉe V. A. R. A. k S. A. R. O. V. (radio-societoj) ni klopodos akiri disaŭdigon de esperanto-kurso k komunikoj.

La malnova estraro estas reelektita escepte K-do *Krijt*, kiu eksiĝis kiel estrarano. Novelektita estas K-do *de Lange*. Per instiga parolado al la kongreso, ke ni sukcesu daŭrigi niajn laborojn favore al nia movado, K-do *Faulhaber* fermis la kongreson. Kiel kongresa urbo por la proksima jaro estas elektita Antverpeno, laŭ invito de la tieaj Gek-doj. Okazis dum la kongreso apartaj kunsidoj de ITETT, SAT-anoj, sovetamikoj k soc. frakcio.

La 16-an vespere okazis *interfratiĝa vespero* bonege vizitita. Ĉi tiu aranĝo havis speciale kontraŭmilitan karakteron. Prezentata estis la filmo « Neniesland ». En tiu filmo diversnacianoj pro milita sorto estas kune, sed apenaŭ povas interkomprenigi sin. Ili estas viktimoj de la milito. Fine pro la milito preskaŭ freneziĝintaj, ili ekmarŝas por kontraŭbatali la militon.... Milito... kial? por kio?....

En tiu aranĝo kunlaboris *I. V. A. O.* (Instituto por lab. klerigo). La tuto restos longe en la memoro de l' ĉeestintoj. Kaj nun... antaŭen!

La sekretario.

13-a Kongreso de F. E. O. en Ljono (Lyon).

Ĉi tiu kongreso okazis la 15-17. aprilo. Partoprenis ĝin 35 Gek-doj. Reprezentitaj estis 13 grupoj k la belga sekcio.

Pri la agado lastjara ni citas el la estrara raporto : Fine de decembro 1932 FEO havis 517 membrojn en Francio, 124 en Belgio k 29 en Svisio, sume do 670. Ĝis 20. 2. 33 estis 91 novaliĝoj; sekve reala stato de 761 membroj. Nur unu jaron post la skismo tiu rezulto certe estas kontentiga. En 1931 forlasis la asocion pro la skismo ĉ. 200 membroj; aliflanke la « socialisto » Chamarre (vd. « S-ulo » n n-ro 404) fondis apartan « Komitaton » ekster FEO. En Belgio apartiĝis la Lieĝa distrikto; tamen per kontraŭagado FEO sukcesis jam restarigi 3 grupojn en tiu regiono. Novaj grupoj en 1932 en : Angers, Drancy, Laon, Lille, Neuves-Maisons k Bordeaux. Restarigitaj grupoj en St-Denis, Ĝenevo, Alĝer. Nia influo konsiderinde kreskis per pliigo de l' abonantoj k ponumera vendado de « Travailleur Espérantiste » (Esp. Laboristo). Speciala sistema propagandlaboro estis farata en sindikataj medioj (K-do Paris organizis tiun fakon). Korespondkurso de l' asocio (K-do Robert) funkciis en sama amplekso kiel antaŭjare. 252 personoj komencis lerni laŭ tiu kurso. Estis farataj 600 alvokoj (200 pli ol antaŭjare) en gazetoj ktp. Kurso ĉe la supera Laborista Instituto de C. G. T. (Parizo).

La agadraporto de la estraro estis-

akceptata, post diskuto sufiĉe profunda, per 322 voĉoj (mandate donitaj) kontraŭ 5, ĉe 42 sindetenoj. La financa raporto estis akceptata post kritiketo pri nesufiĉe bona funkciado de l' kontrolkomisiono.

Inter div. proponoj rilate propagandon, gazeton, aliĝon, instruadon, kiuj estis akceptataj pli malpli modifite, troviĝis tiu pri la deviga abono de l' anaro al « S-ulo » laŭ la iniciato prezentita ĉe la lasta SAT-Kongreso. Tiu propono, subtenita de la pariza delegito, estis *malakceptata* preskaŭ unuanime de la ceteraj grupoj, ĉefe pro la altigo de l' kotizo trudata per tia decido.

La kongreso finiĝis, akceptinte protestrezolucion kontraŭ la Hitlera reĝimo k komisiinte la Parizan grupon elekti la novan estraron k ankaŭ novan sekretarion, pro tio ke K-do *Kaŝon* ne plu akceptas tiun postenon.

Okazis la 15-an de aprilo salutvespero kun festeto, kiu estis bone vizitita. Post la laborkunsidoj oni ekskursis al socialiste estrata komunumo Vilerban (Villeurbanne) kun belaj modernaj konstruoj, realigoj de la soc. urbestraro.

La jarkunveno
de l' Ĉeĥoslovakia Ligo de Lab. Esp-istoj

okazis la 9 aprilo en *Prago*. La organizo estas malgranda k same la rezultoj. Tamen ne mankas skismigaj provoj, kvankam la nombro da anoj estas nur 130. Kunvenis 11 delegitoj el 5 lokoj, kiuj decidis transdoni la centron al la grupoj en *Plžen*.

La Ligo helpis dum la ITF (transportlab.) kongreso, kiu okazis dum somero 1932 en Prago, per ekspozicio k gvidado tra la urbo dum ekskursoj. Dum la jaro fondiĝis nova organizo en Ĉeĥoslovakio por germanlingvanoj. Tion oni ne povis malhelpi. Ĝia organo estas tiu de la aŭstriaj K-doj.

La Ligo sukcesis eldoni ĉeĥlingve la broŝuron « La Lab. Esperantismo », kies tradukon prizorgis K-doj el la grupo « Kulturo » en Plžen. La hektografita « Bulteno » aperas regule 10-foje dum la jaro, verkita en esperanto, k kun ĉeĥa propaganda paĝo.

Venis propono aliĝi al IPE, kiun subtenis unu delegito. Kontraŭe *ĉiuj aliaj* subtenis proponon resti sendogmeca, nepolitika organizo. La adreso de la Ligo estas tiu de K-do *J. Pelcman*, Sladkovského 29, III, *Plžen*, Ĉeĥoslovakio.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Notu la novajn poŝtĉekajn kontojn por viaj pagoj :

Bruxelles	**n-ro**	**350**	**189.**
Kopenhago	**n-ro**	**4**	**986.**
Leipzig	**n-ro**	**85**	**148.**
Stockholm	**n-ro**	**74**	**153.**
Wien	**n-ro**	**D-109**	**068.**
Zagreb	**n-ro**	**41**	**448.**
Zürich	**n-ro**	**VIII-200**	**49.**

ĉiuj je nomo de SAT, 23, rue Boyer, Paris 20.

Komuniko de la Driekcio.

Pri la Jarlibro.

Ricevinte de kelkaj K-doj informpetojn pri la dato de apero de la nova Jarlibro, ni bedaŭrinde devas sciigi, ke en la nunaj cirkonstancoj estas neeble pensi pri baldaŭa aperigo de la Jarlibro. Ni posedas ankoraŭ tre limigitan kvanton da ekzempleroj el la Jarlibro por 1932, je la dispono ĉefe al tiaj novaliĝantoj, kiuj estas izoluloj en siaj lokoj k ne havas eblon konsulti la Jarlibron ĉe aliaj K-doj.

Ĉefa kialo por prokrasto de la eldono estas la mona flanko. Tamen ankaŭ alia motivo nuntempe malrekomendas la tujan aperigon. Ĉu la Jarlibro en ĉi tiu momento povus esti tia, kia ĝi devas esti : fidinda konsultilo? Ni opinias, ke ne. Ĉu anoj en Germanio (en la lando, kie ni ĉiam havis la plej grandan nombron da anoj, escepte Sovetion por unu jaro) k kiuj dezirus enpreson de siaj nomo k adreso en la nunaj cirkonstancoj? Tio validas eĉ por la kazo, se ni aperigus nur la adresojn de perantoj.

Kun la paso de la tempo — ni tamen ne perdu la esperon — la situacio povos ŝanĝiĝi. Ĉiuj ja konsentas, ke nia Jarlibro havas valoron nur, se en ĝi troviĝas adresoj el kiom eble plej da regionoj (k ne nuraj matrikuloj aŭ x-signoj).

Ni petas kompreneman konsideradon ĉe la malpaciencemuloj!

Elekto de Plenum-Komitato

La 5-an de majo finiĝis la limtempo fiksita por propono de kandidatoj por nova P. K. Ĝis tiu dato la SAT-anaro el neniu loko en la mondo prezentis kandidatojn. La afero restas do nesolvita, k ni tial plilongigas la limtempon por prezento de kandidatoj, ĝis... troviĝos rondo, kiu akceptos starigi en sia urbo la novan P. K. Ĉiuj rondoj estas petataj repritrakti ĉi tiun problemon.

Aperis specialnumero

MAJA

de SENNACIECA REVUO

Dukolora, bele ilustrita, 16-paĝa.

Kun unuamajaj artikoloj, voĉoj el Germanio k multaj aliaj interesaj legaĵoj.

Legu k legigu ĝin. Zorgu pri ĝia disvastigo!
Prezaro :
1 ekz. 1.80 fr. fr., 10 ekz. 10.50 fr. fr.,
5 ekz. 6 — 20 ekz. 19.50 —
ĉiu plia deko 9 fr.

Deziresprimo.

Al la Plenum-Komitato. *Parizo.*

Ni SAT-anoj en Dortmund deziras, ke la Amsterdamaj K-doj konsistigu la estontan Plenumkomitaton k Direkcion de SAT.

18.4.1933. La komisiisto : *H. Falkenherr (10 084).*

Tra la esperanta gazetaro.

Trafis nin la n-ro 13 de « Esperanto-Lando », gazeteto eldonita en Usono en angla k esp-a lingvoj. Sur la 4-a paĝo troviĝas vere tre strangaj, aŭ pli ĝuste, amuzaj diroj de *G. Savil* pri la skismo, okazinta en la lab. esp. movado : « La komunistoj malsukcesinte konkeri SAT k komunistigi ĝin provis ĝin detrui. SAT-gvidantaro siaflanke permesis kontraŭrevoluciajn (laŭ Marks) artikolojn en sia oficiala organo « S-ulo ». Tiel ili oferis al la opozicio ŝancon k argumentojn por fondi, antaŭtempe, unupartian k al SAT rivalan organizon.... » Sendube G.S. ne scias, ke ekde sia fondiĝo troviĝas en SAT anarkistoj, kiuj ne estas marksistoj k ankaŭ I.S.K.-anoj, kiuj asertas, laŭ Nelson, ke la marksismo estas tute erara. Sed, se G.S. volas, ke nur marksistoj troviĝu en SAT, li ankaŭ devus difini la veran, la sole aŭtentikan tipon de marksisto. Ni ja konas almenaŭ dekon da « marksistaj » skoloj. Kiam teologoj disputas pri la biblia enhavo, ĉiu opinias pli bone ol aliaj kompreni ĝin. Estas al tia problemo nur unu solvo : imite al la katolikoj elekti ian papon, kiu, inspirite de la diiĝinta Marks, donos la sole ĝustan respondon al la pridiskutataj demandoj. Al G.S. ni do diru, ke la gvidantaro de SAT honeste aplikis la Statuton, antaŭe aprobitan per referendumo de grandega plimulto.

Kiu estus kredinta antaŭ unu jaro, ke S-ro Jung, la direktoro de « Heroldo », iam solenus en sia gazeto la 1-an de majo : « Festo de Laboro »?! Sed jes ja, S-ro Jung estas lernema disĉiplo, kiu komprenas la signojn de l' tempo : Hitler leĝigis la « feston de laboro » k T. Jung subite malkovras sian korinklinon por la laborista tago. « La laboristaro tutmonda ne povus elekti al si pli taŭgan tagon por festi la laboron », komenciĝas fie hipokrita alvoko (fruntpaĝe en la n-ro 722), kiu havas kiel celon almozumi mondonacojn, — kompreneble ne por la komercista poŝo de J., sed por la miloj da senlaboraj mank kaplaboristoj » esp-istaj, kiuj bezonas ricevi per tiu mono la *sendependan* (??) organon de l' esp. movado. Sciu, ke en « Her. » la aresto al kelkmiloj da marksistoj estas konsiderata kiel neatentinda bagatelo, kvazaŭ « akcidento »; male : « hodiaŭ la situacio en Germ. estas pli trankvila k pli sekura ol antaŭe... » (!) insistas ripete S-ro Jung, la novebakita unuamaj-entuziasmulo. Kia komediaĉo!

« Esperanto » (Ĝenevo) solenis la jubileon de la 25-jara ekzisto de U.E.A., en la 28. aprilo 1933, per historiresumaj artikoloj k represo de artikoloj de la fondinto, H. Hodler. La plej glora epoko de U.E.A miaopinie estis la dummilita. Tiam la asocio kreis helpservon, kiu

« krom morala gajno havis ankaŭ materian sekvon, tiel ke la Asocio povis trapasi la jarojn 1914-1918 sen notinda perdo. La revuo *Esperanto* aperis dum la tuta milito (escepte dum aŭg.-dec. 1914) malgraŭ ĉikanoj ĉiaspecaj. »

Kaj jen Hodler-cito (presita unuafoje en majo 1910), kiu montras la klarvidon de tiu esperantista gvidanto k lian komprenon pri la valoro de komuna lingvo por la vivo de tutmondaj organizoj : « ... Dum la internaciismo kunigas *nacianojn* k penas faciligi iliajn interrilatojn, sin apogante antaŭ ĉio sur la *nacioj*, konsiderante la naciojn kiel la ĉefajn organojn de ĉia internacia organizo, la esperantismo kunigas *homojn*; ĝi ignoras naciecon, lingvon k rason.... »

« La Mondo », monata organo de la Ŝanĥaja Esperantista Ligo, prezentas al ni en sia n-ro 3/4 per foto la anojn de la fondkongreso de l' nomita Ligo. Laŭ tiu bildo k laŭ la titoloj de kelkaj artikoloj, ekz. pri la sovetia esp. movado, ni opinias rajti konkludi, ke temas pri proleta eldonaĵo. Certon ni tial ne havas, ke la plej granda parto de l' enhavo estas ĉinlingva. Estas ankaŭ multe da spaco dediĉita al lingvaj studoj. Ni trovis jenan pripensigan sciigon en ĝi : « Kiam en Brita Hindio oni projektis potencan radiostacion, oni lasis la projekton. Pro kio? Ĉar en lokoj, kies loĝantoj povus aŭskulti la disaŭdigon de tiu ĉi stacio, oni parolas en cent sepdek diversaj lingvoj. » La legantoj mem konkludu.

« Laborista Esperantisto » (Nederlando) aperigis en sia mez-aprila n ro fruntartikolon de K-do Lanti : « Ameriko ekzistis jam antaŭ Kolumbo » en holanda lingvo. Tiun ĉi artikolon la Federacio de Nederl. Lab. Esp-istoj aperigis ankaŭ kiel apartan broŝuron por sia propagando. Tre varbefika estas la unuamaja n-ro de « L.E. » kun abundo da eltiroj el leteroj esp-istaj ricevitaj el multaj regionoj de la terglobo. Plie enestas salutoj de fakunuiĝoj nederlandaj al la esp-istaro okaze de la lab. Majo, k multo alia. 16-paĝa estas tiu n-ro.

Aperis en marto la 1-a kajero de « Politika Sociala Revuo[1] », *franca* laŭ prezentmaniero k enhavo, impona per sia amplekso, serioz-impresa per la nomaro de l' gvidkomitatanoj (pluraj universitataj profesoroj). La redaktoro estas G. Waringhien. Programo : liveri al la klera publiko seriozajn k dokumentitajn studojn pri ĉiaj problemoj de la socia vivo. Absolute sendependa kontraŭ la partioj, religioj aŭ nacioj, tamen... pli favora al ĉio, kio proksimigas k kunigas la naciojn, ol al tio, kio disigas ilin. La tradukoj (ĉar temas nur pri tradukoj) en la unua kajero rilatas nur francajn aŭtorojn; ili estas trafe elektitaj. Nefrancojn precipe interesos la artikolo de Siegfried pri la franca karaktero vidalvide al la moderna mondo. Sed ĉio alia ankaŭ estas interesa.

Lingve ni notis preferojn de l' red. por internaciecaj, sed pli longaj formoj : *socialo* (anst. socio), *ekonomiko* (anst. ekonomio en la senco de sciencos, la formon « deper » (p. 47) post pasivo anst. la klasika « de ». Preseraroj bedaŭrinde estas sufiĉe multaj. *(Daŭrigota.)*

[1] 80 pĝ., form. 15×25 cm., trimonata. Jarabono 40 fr. fk. Admin. Librejo Félix Alcan, 108, Bould Saint-Germain, *Paris-6*.

****

Ili kritikas alies pekojn k ne vidas la proprajn.

En la 5-a n-ro de « La Socialisto » estas artikolo, en kiu la okazintaĵoj en Germanio estas iom pritraktataj.

« ... estiĝis interne de la laborista klaso tiu bedaŭrinda fratbatalo, kiu sendube fornaŭzis grandan parton de la germana popolo, eĉ de la proletaro. Sub la atakoj de dufronta mensogmilito, sub la duflanka « ponardpuŝlegendo » k fine sub iuj taktikaj eraroj de la estraro la socialdemokrata partio ruiniĝis. Kio estis bezonata : la unueco, ne estis atingebla.... »

Sed en la sama artikolo estas propagandate pri starigo de socialista esp-a internacio. « La Socialisto », imite al « Internaciisto », fariĝis skismiga organo en la lab. esp. movado.

****

EL HITLERIO

« Nia SAT-rondo ankoraŭ vivas. Ni kunvenas ĉiusemajne, regule ŝanĝante la ejojn. Okazis ĉe du K-doj hejmtraserĉoj per la policistaro. Unu K-do estas transportita en « internigejon », kie li nun estas depost 6 semajnoj. Multaj libroj, speciale kontraŭmilitaj, estas konfiskitaj. Niaj korespondaĵoj el ekstergermanaj landoj, ĉefe el Sovetio, pruvas al ni, ke la Gek-doj ekster Hitlerio ne estas ĝuste informitaj pri la vera situacio en Germanio. Ni avertas tial ĉiujn Gek-dojn esti singardemaj dum interkorespondado kun germ. K-doj, ĉar la letersekreto ne plu ekzistas ĉe ni. Samtempe ni petas la ekstergerm. SAT-anojn atentigi la sovetiajn Gek-dojn, ke ili ne plu rekte skribu al siaj germ. amikoj ĉar aliel ili endanĝerigas ĉi tiujn. Spite ĉio ni ne malesperas; la nacieca febro, kiu nun malsaĝigas la popolon, ne daŭros eterne. Almenaŭ ĉiu devas lerni el la okazintaĵoj; la lab. partioj tro komplezis al la naciismo. Vivu SAT! »

POR ŜTOPI LA BRECON

22 listo.

Nederl. Fabriklaborista Unuiĝo.............. 4.50 gd.
Interfratiĝa vespero F. L. E.-Kongreso.......... 15.05 gd.

Voĉo el Germanio[1].

... 15-V-33.

Leginte en unu el la lastaj n-roj de « S-ulo », ke nialandaj geanoj ne sendas konkretaĵojn, mi nun plenumas mian devon al nia organo. Per malmultaj linioj mi prezentos bildon pri la situacio; kompreneble mi ne povas subskribi per mia nomo nek matrikulo.

La 5-an de marto okazis la tutregnaj balotoj. La 9-an sammonate la nacisocialistoj transprenis ĉi-loke (Bavario) la potencon. Tio okazis jene : ili surprizatake okupis la domon de la socialdemokrata gazeto, detruis komplete ties kompostejon, ruinigis la plej multajn presmaŝinojn, elrabis la direktorloĝejon, ktp. Plie, ili ekarestis amase proletojn k ankaŭ etburĝajn, ja eĉ burĝajn personojn. Ili atakis ĉiujn judajn komercajn entreprenojn. La kontraŭjuda atako cetere finiĝis en la sama tago, en kiu ĝi estis komencita — laŭdire venke, sed laŭsperte — fiaske. Ili kaptis k forkondukis la marksistajn gvidantojn k funkciulojn k bategadis ilin. Ili instalis internigejon (koncentrigan kampadejon) en Daĥaŭ, kien la kaptitoj estas forigitaj.

La « nacia revolucio » ĝis nun nenion efektivigis, escepte solenojn k festegojn, por ne forgesi pri la plikariĝo de preskaŭ ĉiuj vivrimedoj. Neniu banko, neniu minejo, neniu granda magazeno nek industria entrepreno estas « naciigita » (ŝtatigita) nek forprenita ke la posedantoj. Vere la nacia revolucio ĝis nun « liberigis » nur la etburĝajn vendejojn, kiuj delonge jam estas malutilaj al la socio. La nuna nacisocialista movado nur estas rimedo por la freneziĝinta etburĝaro por kontraŭbatali la judan konkurencon.

Kial la faŝismo en Germanio tiom povis sukcesi? Mi respondas, ke la germana proletaro staris plej grandparte sub la gvido de « laboristaj gvidantoj », kiuj depost 1914 ĉiam pli burĝiĝis k perdis la kontakton kun la mizerstata laboristaro. Ilia ĉefa tasko estis kontraŭbatali la partion malriĉulecan, la kom. partion. Certe ĉilasta ankaŭ multe eraris, sed almenaŭ ne estis perfida kontraŭ sia klaso. Nun ne estas tempo por juĝi pri tio ĉio. Tempo nun estas por provi gardi la lastajn eblojn por kontraŭstari la bestiĝintan nacisocialismon.

Jen kelkaj veraj bildoj pri la bruteco de la « liberigantoj » : Miloj da simpluloj troviĝas en la karceroj k koncentrigejoj, kie ili plej kruele estas bategataj. Centoj el la kaptitoj simple « malaperis » aŭ « dum forkuro » estas pafmortigitaj. El lokaj (komunistaj) gvidantoj estas mortigitaj K-do Götz, distriktestro, k K-do Dresel, parlamenta frakciestro, kiu laŭ gazetaj sciigoj « memmortigis »

[1] Al neabonantoj de « Senn. Revuo » ni sciigas, ke en la ĉi-monata n-ro de tiu revuo aperis multaj ekstraktoj el leteroj de germ. K-doj sub la titolo « Voĉoj el Germanio ». (Vd. la anoncon sur p. 87.)

sin. K-doj Hirŝ k Olŝevski estas mortige batvunditaj. K-do Baimler, partigvidanto, laŭ gazetsciigoj « fuĝis ». Kien? Ĉu li estas mortigita aŭ vere sukcesis forkuri, mi tion ne scias. K-dino Knödler, edzino de antaŭurba urbparlamentano, en la esplor-arestejo « memmortigis » sin per pendigo. Multaj el la memmortigoj certe estas oficialaj informoj nur por kaŝi la veron, ke la bruteco de la « liberiga » nacia revolucio postulis viktimojn por komplezi la sangavidon de ĝiaj adeptoj.

El la gvidantoj de la socialdemokrata partio, « Regna Standardo » k ankaŭ ĉiuj aliaj soc. dem. organizoj la plej multaj estas kaptitaj k troviĝas en la koncentrigejoj. Se tiu ilia sorto ne estus ero en la vico de la persekutoj de l' faŝismo k tial en sia rekta konsekvenco bato kontraŭ ni proletoj ĉiuj, ĝi vere k sincere estas plenmerita.

Rilate nian lingvan movadon same ĉio estas malhelpata. Laŭsciige ĉe la LEA-estraro multo estas konfiskita, « Arb. Esperantist » k « Isto » estas malpermesitaj; la distriktoj k grupoj nur pene povas laboreti. Certe ĉe S.E.A. la malfaciloj estas samgradaj kiel ĉe L.E.A. En nia distrikto unu LEA-grupo estas arestita ĝis la lasta membro, el aliaj grupoj multaj K-doj estas enkarceroj. La unuan de majo la laboruloj devige manifestaciis, ĉar forrestante de la manifestacio, ili estus perdontaj sian laboron.

La Gek-doj, kiuj korespondas kun nialandanoj, bonv. nepre ne skribi endanĝerigajn sciigojn k nepre akurate k *legeble* siajn adresojn.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Ĉe la junularo.

Juna K-do el Danio atentigis nin pri la neceso doni lokón en niaj gazetoj al la junularo. Bedaŭrinde ni ne plu povos disponi tutajn paĝojn por la « fakoj »; sed ni kompreneble volonte akceptas atentigojn k mallongajn *artikolojn de pedagogoj, junuloj, liberpensuloj k. c., kiuj laŭpove trovos lokon, ĉu en « S-ulo », ĉu en « S. R. »*

Ĉi tie sekvas la dua parto de artikolo pri la pasintjara junulara tendaro okaze de la 12-a SAT-Kongreso. La unua parto jam aperis en la n-o 396 de « S-ulo ».

Red.

Ni pripensis, kiel ni aranĝu la nutradon. Granda parto de la partoprenantoj ja estis vegetaranoj. Fine ni decidis prepari nur vegetaran manĝaĵon k lasi al la viandmanĝantoj, ĉu ili provizu sin mem per kolbaso ktp. Tia aranĝo certe estas la plej favora por ĉiu tendaro; vegetarano ne povas adaptiĝi al viandmanĝaĵo, dum viandmanĝanto ĝenerale povas facile rezigni viandon por kelka tempo.

Por la tendaro sur Katarinenlinde ni ne havis precize fiksitan *programon*. Al kelkaj K-doj tio plaĉis, aliaj ne estis tute kontentaj pri tio. Fakte tute detale antaŭfiksita programo ne estis efektivigebla. La vetero estis tre ŝanĝiĝema; pro tio unufoje estis pli rekomendinde daŭrigi la komencitan pilkludon anstataŭ komenci la antaŭe fiksitan ĥorekzercon. La mastrum-laboroj forprenis multajn horojn; krome ni estis gastoj de la Eslingaj naturamikoj k gimnastikuloj. Niaj Sulcgrisaj gastigantoj komune vizitis nin en la hejmo, la Ŝtutgartaj Gek-doj dufoje venis al la tendaro, k ĉiun tagon posttagmeze k vespere multaj Gek-doj el diversaj lokoj ĉirkaŭaj estis vizitantoj ĉe ni. Pro tio la tendaro estis tre bona propagando por nia lingvo. Sed kompreneble antaŭfiksita programo pro tio ofte ŝanĝiĝis. — Ni regule gimnastikis antaŭ la lavado. Krome ni tre fervore ekzercis parolĥoron por la salutvespero de l' kongreso. Kelkfoje ni kursis pri la militdanĝero k nia sinteno en okazo de militservo k de milito; k ni atingis pozitivajn rezultojn.

Ne estas eble k eĉ ne konsilinde rigide insisti pri antaŭfiksita programo. Oni adaptu la programon al la cirkonstancoj : bonan veteron oni utiligu por bano, migrado, ludo, ĉe malbona vetero oni favoru la kurs-laboron. Por sukcesplena kurs-laboro estas necese, ke la partoprenontoj konigu, pri kiuj temoj ili interesiĝas, por ke la tendar-estro elektu temon iagrade interesan por ĉiu; aŭ la estro diskonigu difinitan temon k la partoprenontoj komuniku, ĉu ili partoprenos la kurson.

Estas nepre necese apogi la kurslaboron k la tutan tendar-laboron per *lingva* kurso. En Katarinenlinde, la plej multaj partoprenantoj ne estis tiom perfektaj esp-istoj por tre vigle partopreni la diskutojn; ofte eĉ mankis la vortoj ĉe la mastruma laboro. Ĉiuj certe pli-perfektiĝis en la tendaro. Sed laŭ mi oni devas sisteme akceli la perfektiĝon per ĉiutaga mallonga kurso.

Krom gimnastiko, mastrumado, ekskursoj, kurso pri speciala temo k lingva kurso estas rekomendinda ankaŭ kantĥoro, por ke la esperanto-kantado pli bone prosperu en niaj medioj. — Granda tendar-fajro estas tre bela fino de la taglaboro. Sidante ĉirkaŭ la fajro, ĉiu povas rakonti el sia vivo, oni povas kanti, eble iu deklamas k. s.

Sed por efektivigi tian ampleksan programon, la tendarestro bezonas kunlaborantojn. Ne estas eble, ke li aŭ ŝi gvidu mastrumadon, lingvan kurson ktp. Ankaŭ la estro havu iom da libera tempo por si mem. Tial Gek-doj, kapablaj estri ium aferon, anoncu tion ĉe la preparo.

Kompreneble oni ankaŭ varbu ĉie partoprenantojn por tendaroj. Tiurilate la pasinta tendaro havis malfavoran sorton. Laŭ mia peto mi ricevis de du Gek-doj adresojn de eventualaj interesiĝantoj. Al ĉiuj (60-70) mi sendis invitojn, krome artikoleton al 2 naturamikaj gazetoj francaj. Tamen la nombro da partoprenintoj ne estis granda, ĉefe pro la ekonomia krizo.

16.900.

AVIZO

Pro la deviga ŝanĝo de la presejo k la malfacilajoj, kiujn ni havas momente rilate la akuratan liveradon de la gazetoj, ni decidis aperigi la venontan kajeron de « Sennacieca Revuo » kiel duoblan numeron, kiu aperos proksimume je la 1-a de julio.

Ni liveros tiun n-ron al ĉiuj abonintoj, ankaŭ tiuj, kies abono finiĝas en junio. Sed ni fidas k esperas, ke speciale tiuj Gek-doj tute akurate plupagu kotizon k abonon (por la 3-a kvaronjaro aŭ prefere por la duono de 1933). Pli ol iam ajn la sukceso de SAT dependas de la fidelo de ĝiaj anoj!

Rilate al « S-ulo » ni klopodas por atingi, ke la venonta numero aperu AKURATE je la 25-a de junio!

Direkcio.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

En nia movado.

KRONIKO

Britio. En urbeto apud *Letchworth* K-do Brukenberger fondis lab. esp. grupon kun 10 m. Komenciĝis tie nova kurso kun 12 senlaboruloj. Ĉe neŭtrala esp. kongreso en Oksfordo s-ro Scott propagandparolis antaŭ 15 p. kiuj aĉetis ĉiuj « S-ulo » n k « Manifeston de Sennaciistoj ».

Francio. *Neuves-Maisons.* Nova grupo kun 40 anoj. La kursojn finis 29 p. Propagando okaze de Unua de majo.

Hispanio. En urbeto *Manises* proksime de Valencia komenciĝis kurso por 15 gejunuloj, gvidata de ĉeĥa K-do.

Ni ricevis jenan leteron kun insista peto pri publikigo :

Kelkaj membroj de la Pariza Esp. Laborista Grupo al Sinjoro Jung.

Sinjoro,

Ni indigne protestas kontraŭ la artikolo aperinta en n° 13, paĝo 2, de *Heroldo*. Ne pro la titolo ni disputu, ĝi prave taksas vian prozon : « Mensogoj pri Germanio »; vi ja provas encerbigi ilin al ni. Vi parolas pri bonordo, kiam oni enkarcerigis nur « kelkmilojn da Marksistoj ». Vi montras al ni la « tute demokratie elektita parlamento ». Tamen ĉiuj, vi ankaŭ, scias, kiel « demokratie » povis propagandi la opoziciaj partioj. Ŝtelon de l' laborista havaĵo, « popol- k sindikatdomoj », vi eĉ ne mencias.

Ne kredu tamen, ke ni miras; tute ne. Ni ĉiam konsciis, en kia koto dronas via « neŭtralismo » k tio estas nur plia pruvo. Subiĝemaj, flatemaj, vi pli zorgas vian personan profiton ol intereson de esperanto. Vi senpantaloniĝus sub potenculo k proklamus, ke vi verŝas vian sangon por servo de nia movado.

Ni esperás, ke la ĉiulandaj konsciaj laboristoj trovos pli utilan viŝuzadon por via paperaĉo, k — ke ili komprenos sian solan vojon : al sennaciece laborisma esperantismo.

Samtempe ni profitas la okazon por kuraĝigi niajn germaniajn Gek-dojn en ilia senhalta batalo kontraŭ ĉiajn Jungaĉojn k Jungestrojn en la mondo.

Ankaŭ ni alvokas ĉiujn ne aboni al tiu faŝista gazeto k petas, ke kiuj jam abonis, tiuj proteste malabonu.

Subskribis : *A. Ozre, M. Aspes, Hamleto, Auberger, Meyerpaul, R. Pollet, Goicocha, Karmazin, Gallo, L. Revel, Merigot, Laillet, P. Pâquier, Lesage, Natnol, E. Baro.*

Ni volas faciligi esperanton per tio, ke ni eldonas pli facilajn lernolibrojn en ĉiuj lingvoj. Germana eldono de tia lernolibro aperis. 144 pĝ.; moderna aranĝo. Prezo 1 mk.g. (l. 25 sv. fk.. 1. 60 aŭstr. ŝil.) aŭ egalvaloro en sveda mono, afrankite. Mendu ĉe Eldonejo Rapida Venko, *Uppsala*, Svedio.

NACIISMO

Studo pri deveno, evoluado k sekvoj

de K-do E. LANTI

Tiu originala esp. verko pritraktas funde k laŭ scienceca maniero la gravan nacian problemon.

124 pĝ. — Prezo : 7.20 fr. fr.

ADMINISTREJO DE SAT, 23, RUE BOYER, PARIS 20

Ekster nia movado.

La konata stratosfero-flugisto *P.kar* (Piccard) diris dum intervjuo, ke esp-o povas havi grandan signifon por la scienco.

Pro la sukceso de l' esperanta eldono de gvidilo pri Milano k la Lombardaj Lagoj, la Itala Turista Unuiĝo decidis eldoni esp. gvidilon ankaŭ pri Romo.

La 16-an ĝen. kunvenon de Ĉeĥoslovaka Esp. Asocio (en Hradec Kralové. 19.3) partoprenis 61 membroj el 31 lokoj. Skribe reprezentitaj estis krome 76 membroj. Estis akceptita rezolucio malfavora al la nova organizformo de l' internacia movado, proponita ĉe la Pariza Kongreso.

En 18 lokaj grupoj de Slovaka skolta unuiĝo katolikaj geskoltoj lernas esp-on.

La *hungara poŝto* decidis eldoni bild-poŝtkartojn kun oficiala esperanto-teksto. Aperis belaspekta ilustrita prospekto de la Budapesta Foiro (majo 1933) en esperanto.

Laŭ « La Socialisto » la esp. kurson, kiun prof. Kilian disaŭdigas el *Brno*, aŭskultas 2000 personoj el 19 landoj.

La esperanto-societo en *Vilno* (konsistanta ĉefe el judoj) protestas en cirkulero kontraŭ la okazigo de l' nunjara universala kongreso en Kolonjo (Köln). Cetere oni aliĝas laŭtestuda tempmezuro al tiu ĉi « jubilea » kongreso. Bojkoto.... Bojkoto....

La internacia servo de « Stavovska reforma » en Prago (*Praha* I, Konviktska 5) utiligas esp-on por diskonigi sian planon pri reorganizo de la ekonomia vivo en la mondo.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Klara Mejer-Viĥman : Kontraŭ la regantaj perceptoj pri krimo k puno. El la nederl. trad. *Nikune.* Eld. Komitato por agado kontraŭ la reg. perceptoj pri krimo k puno, *Amsterdamo* 8 p. 12×18 cm. Prezo : 10 ekz. 0,50 h. guld. (1 sv. fk.) ĉe adr. : Olympiaweg 56, *Amsterdam-Z.*

Tre utila k disvastiginda broŝureto pri la demando de krimulo k juĝado. Cetere iam la teksto de tiu parolado de socialistino aperis en « S-ulo ».

P. Nylen : Esperanta-sveda Vortaro. Eldona Societo Esperanto, *Stockholm,* Box 698-232 p. 11,5×18 cm. Prezo broŝ. 3.75 kr., bind. 5.-kr.

Tre ampleksa k riĉenhava vortaro, zorge kompilita.

Ŝlosilo por svedlingvanoj. Nova eldono (120-140 miloj). Eldona Societo Esperanto, *Stockholm.* Prezo : 0,10 sv. kr.

Einar Dahl : Dialogoj en Esperanto. Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 1932. — 31 p. Form. 11×19. Prezo : 0.50 sv. kr.

La libreto entenas materialon por perfektigaj kursoj k grupaj kunvenoj en formo de dek dialogoj kun simpla enhavo rilata al la ĉiutaga vivo. Prilingve ni notis : « ŝipo malŝarĝas en la haveno » (devas esti : *malŝarĝiĝas* aŭ *estas malŝarĝata*) (p. 7). Anst. « kaj... kaj » oni diru « tiel... kiel » (p. 11); « no » (anst. *nu*) (p. 12).

Seppik-Malmgren. Systematisk kurs Esperanto. (Sistema kurso). Eld. Societo Esperanto. Stockholm. 88 p. Form. 11×17. Prezo : 0.75 sv. kr. Aperis jam 2 eldonoj.

Lernolibro, uzebla en rektmetodaj kursoj en Svedio, kun multaj svedlingvaj klarigoj k komentoj. Ĝi estis bone akceptata, ĉar vendiĝis 3 mil ekz-oj dum tri monatoj. Ni notas rekomendon al laboristaj kursanoj aliĝi al SAT. Nova lingva formo : « Danmarko » (p. 29) por Danio.

Esperanta gvidlibro pri la linioj de la ĉeĥoslovaka ŝtata fervojaro. 11 geografiaj kartoj kun 140 bildoj k klarigaj tekstoj. Senpage sendata al ĉiu petanto. Adreso : Ministerio de Fervojoj, *Praha.*

Nova gazeto.

Fajrero. N-o 1. Jan./febr. 1933. Dumonata interligilo de la Intern. Proleta Kooperado en la trinacia regiono : Rejnlando-Valonio-Limburgo. Adm. 26, rue de la Meuse, *Souverain-Wandre,* Belgio. 4 p. Form. 20×30 cm. Abonprezo : *3* b. fr.

Ĉio sciiginda en tiu nova gazeteto tute esperantlingva povus trovi lokon en « S-ulo ». Tamen la redaktoro per sofismaj konsideroj provas pravigi la starigon de sia propra « butiko », kiu devigas la anojn elspezi monon por plia esp-a entrepreno.

La esp-klubo « Laborista » en Åmotfors deziras korespondantojn k informojn pri laborista movado en la tuta mondo. Kolektive aŭ individue. Skribu multnombre! Resp. garantiata. Adreso : John Johansson, Fack 71. *Amotfors* (Svedio).

MEMORNOTO

Represis el « S-ulo » : *Le Coopérateur de France,* Paris, 22. 4, Koop. movado en Stokh. (403).

Priesper. artik. k notojn enhavis : *Neen.* Antverpeno, 1. 4., 1. 5. (rubr.)[1]; *Signalen,* Stokh. (rubr.), 13., 20., 27. 4., 4. 5.; *De Fakkel,* Amsterd. (rubr.), 15., 22. 4., 4. 5., 6. 5. *A Vida Social,* Lisboa, 15. 4. (rubr.)[2]; *Le Nouvelliste,* Pointe-à-Pitre, 11. 3; *Le Progrès,* Lyon, 17., 18. 4.

La revuo « Nervio », Buenos Aires (junio 32) publikigis artikolon de K-do *Lanti* pri Eŭropo-Ameriko kun atentigo pri esperanto.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

ĈEĤLINGVANOJ!

« La Laborista Esperantismo »
de K-do E. LANTI
ĵus aperis en ĉeĥa lingvo!

Jam ekzistis angla, germana, nederlanda k sveda eldonoj de tiu populariĝinta broŝuro, kiu estas bonega propagandilo, ĉar ĝi pravigas k fundamentigas nian movadon.

Mendu do senprokraste k grandkvante la ĉeĥlingvan eldonon ĉe :

Laborista Ligo Esperantista, *Prago VII,* Domovina, aŭ ĉe K-do Pelcman, *Plžen,* Sladkovského 29. — Prezo 2.50 kć, per poŝto 3 kr. Oni povas pagi per ĉeĥoslov. poŝtm. en letero.

[1] La rubriko de tiu ĉi nova kontraŭfaŝisma revuo estas *tute esperanta*; atentinda unuamaja artikolo.

[2] *Tutpaĝa* esp-rubriko! Adreso por kunlaborajoj : « Antaŭen », Rua da Costa 124, 1°, Lisboa.

Prologo !

Karaj vi proletoj frataj,
estu kore salutataj
je la hodiaŭa tago!
Montru ni per vort' k ago,
Ke ni estas kum konscio
membroj de mondfamilio!
— proletecaj laŭ tendenco,
— firmaj en la konsekvenco,
ke plej taŭgas esperanto
por proleta batalanto;
ĉar studad' de idiomoj
taŭgas ne por simplaj homoj.
Kaj laŭ nia opinio :
« ĉiu kulto por nacio
estas kontraŭ homracio,
— ja eĉ ag' de l' reakcio! »
Tial — viro de l' fabriko,
agu ĉiam laŭ logiko :
« Esperanton sur tuttero
en batalo por libero! »
Spite al naci-nebuloj,
— estu ni Sennaciuloj! »

J. Burger (601).

NE PROKRASTU LA KONGRES-ALIĜON!!

Nur se vi aliĝos ĝis la 15-a de junio, la O. K. K. povas garantii pri malmultekosta loĝejo por vi!

KORESPONDADO

GERMANIO

K-do *H. Haasen,* Gasthausstr. 51, *M. Gladbach,* interŝ. PM kun Eŭropo, pref. Hispanio k Portugalio.

PORTUGALIO

K-do *Joaquim Pereira,* ĉarpentisto, Rua da Costa 59, 3° E-do, *Lisboa,* dez. kor. kĉl. Gek-doj, pĉt. Resp. gar.

SOVETIO

K-dino *Lena Ĉeĥović,* Klovskij Spusk 2/1, *Kiev,* interŝ, esp-aĵojn.

K-do *V. Ŝirjaev,* Penteleevskaja 16, kv. 12. *Moskvo* 41, dez. kor.

K-do *K. Ĉenĉov,* Bajkalskaja 44, *Stalingrad,* dez. kor-antojn.

SVEDIO

2 K-doj interŝ. Pl, kĉl. Jen la adresoj : K-doj Gunnar Ström k Ivan Nyquist, L. B. 108, *Hagfors.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

RADIO-PROGRAMO

27 majo :
17.50-18.00 : Brno, 341,7 m, pri Beneŝ.
18.30-18.45 : Zagreb, 307,1 m, parolado.

28 majo :
10.30-10.50 : Marseille, dialogoj, anekdotoj.
21.15-21.45 : Minsk, 1105 m. asteista disaŭdigo.

30 Roterdamaj esperantistoj dez. koresp. kun Gek-doj el la tuta mondo, individue aŭ kolektive. Skribu grandnombre al *J. Peterse,* 2° Rezerveboezemstr. 14, *Rotterdam,* Nederl.

[1] Ĉi tiu versaĵo taŭgas speciale por esti deklamata dum festaranĝoj de grupoj k kluboj.

BRODARD ET TAUPIN, Coulommiers-Paris.